

pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 5/2003 • ISSN 0032-2431



Polaj tradicioj kaj kutimoj: „Lajkonik”

5
2003

Enhavtabelo:

131 ENKONDUKE
HISTORIE

133 Denove malfavora periodo por la Lingvo Internacia (daŭrigo).

137 PORTETOJ – Jan Niecislaw Baudouin de Courtenay.

ALIFLANKE

144 Vendistoj de espero.

LINGVA ANGULETO

147 Praktika uzado de la prepozicio POR.

NUNTEMPE

150 Torunaj esperantistoj semas kaj semas...

154 Jubilea ĈEP-aranĝo en Mielno.

157 La Dua Balta Esperanto-Forumo.

158 Niaj Forpasintoj – nekrologo.

159 Impresoj el la UK en Goteburgo.

160 GRUPE-7.

La kovrilpaĝo: polaj kutimoj – Lajkonik, krakova popola ludo, ligita kun tradicio de provo konkeri Krakovon en XIII jc. fare de mongoloj. Fakte tiu bele vestita viro-ĉevalo devenas de XVII jarcenta modo je Oriento. La nunan vestaĵon projektis en 1904 jaro Stanisław Wyspiański. Desegnis: Andrzej Kołpanowicz.

**polaj
esperantistoj**

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare
eldonas: Eldonejo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>
Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Czesław BARANOWSKI,
Zbigniew GALOR, Andrzej KOŁPANOWICZ, Ilona KOUTNY, Kazimierz
LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA, Stanisław MANDRAK, Danuta
ŻELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Ĉiujn korespondaĵojn kaj materialojn sendu al la adreso de la
eldonejo (tamen prefere retpoŝte: esperanto@hejme.e-tools.pl).

Jarabono pola: 30,00 PLZ pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21
BRE Bank SA-mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> • FEL-konto: <leja-t>

Jaro 97 • N-ro 5 / 2003 • ISSN 0032-2431

aktuala eldonkvanto: 220 ekz.

Karaj legantoj!

Kiam mi legas pri sukcesoj kaj vigla agado de litovaj esperantistoj, antaŭ miaj okuloj staras miaj propraj revoj, kiel ĵus „baptita” esperantisto (antaŭ 25 jaroj...) pri forta, vigla, rekonata socie, profesie organizita kaj gvidata Esperanto-komunumo. Ni, junuloj, estis tiam plenaj de fervoro, kiu ofte ne povis realiĝi pro malpermesoj, cenzuro, kaj manko de tehnikaj rimedoj.

Hodiaŭ antaŭ ni denove povas kreski la espero. Junaj homoj ofte donas ekzemplojn, ke oni povas sukcese agi, verki, varbi, ke Esperanto parolata estas pli grava ol Esperanto-nur-ŝatata.

Baldaŭ en Pola Esperanto-Asocio delegitoj elektos la novan Ĉefan Estraron. Ni ĉiuj zorgu pri tio, ke inter ili troviĝu ankaŭ junaj homoj, havantaj planojn kaj revojn. Kaj nia komuna afero estu, ke ili efektiviĝu!

Nun bonvolu tralegi interparolon kun Maciej Zgondek, dekkvarjara esperantisto el Kutno, kies lernolibro „Ĝu esperantisto!” baldaŭ aperos en la eldonejo Hejme. La aŭtoron mi intervjuis en lia hejmo, kie dum unu-hora interparolo mi trovis la junulon tre interesa kaj matura homo.

Kazimierz Leja: — Kiel komenciĝis via Esperanta aventuro?

Maciej Zgondek: — Antaŭ du jaroj mi ekinteresiĝis pri fremdaj lingvoj. Mi komencis lerni la anglan, germanan kaj hispanan lingvojn. Tiam mia onklino demandis min, ĉu mi aŭdis pri la lingvo internacia. Mi tute ne sciis, kio tio estas. En la juneco de la onklino oni pli multe parolis pri Esperanto ol hodiaŭ. Ŝi neniam lernis ĝin, sed multe pri ĝi aŭdis. Mi eksciis de ŝi kelkajn informojn. Poste mi vizitis la retpaĝon de s-ro Stein (nuna adreso: www.esperanto.pl). Tie mi trovis la lernolibron de Maria Niemirow kaj retinstruistino — sinjorino Danuta Kowalska, kiu ĝis nun multe al mi helpas. Baldaŭ mi finis la bazan interretan kurson, ricevinte mian unuan atestilon. La 20an de novembro 2002 surbaze de miaj tradukoj kaj mia lernolibro oni konfirmis al mi la E-ekzamenon de la dua grado.

KL: — Ĉu vi kredas, ke Esperanto povas esti utila en via vivo?

MZ: — Ĝi jam nun multe helpas al mi en lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Danke al Esperanto mi ekkonis multajn internaciajn vortojn, kiuj ekzistas en la germana kaj angla lingvoj (la hispanan mi bedaŭrinde pro manko da tempo ne plu lernas). Mi ankaŭ pli bone komprenas gramatikajn regulojn. En la estonteco mi volus studi lingvistikon. Mia opinie

ĉiu lingvisto devas ekkoni problemon de lingvo internacia kaj fariĝi aŭ ĝia adepto, aŭ ĝia malamiko. Oni ne povas preteriri Esperanton kaj tute ĝin ignori. Oni devas ĝin ekkoni kaj fariĝi aŭ por, aŭ kontraŭ ĝin. Mi jam decidis. Krome Esperanto ebligas vojaĝadon tra la tuta mondo kaj ekkonon de interesaj homoj.

KL: — Kial vi decidis skribi lernolibron?

MZ: — Mi rimarkis, ke mankas pollingva moderna lernolibro, en kiu oni povus ekkoni ekzemple vortaron rilate Interreton. Mi decidis skribi tian lernolibron. Unue tio estis simple ludo. Mi pensis, ke mi sukcesos krei du, eble tri lecionojn. Tamen poste la lernolibro pligrandiĝadis kaj mi pli kaj pli multe ĝuis ĝian verkadon. Dum tiu tempo mi ankaŭ multe lernis. Multe pligrandiĝis mia vortprovizo kaj gramatiklerteco.

KL: — Kiom longe vi skribadis vian lernolibron?

MZ: — Mi komencis verki ĝin en majo 2002, en decembro jam ĝi estis preta, do ĉirkaŭ ok monatojn. Tamen oni devas memori, ke mi ne traktis tion kiel laboron, sed kiel ludon. Mi verkadis nur tiam, kiam mi volis. Kutime dum semajnofinoj.

KL: — Ĉu vi apartenas al iu Esperanto-klubo?

MZ: — Ne. En mia urbeto ekzistas neniuj Esperantujoj mi kontaktas nur pere de Interreto.

KL: — Per via lernolibro vi faris gravan laboron por E-movado en

Pollando. Ĉu vi opinias, ke dank' al ĝi tiu movado povos disvolviĝi?

MZ: — Eble. La pola esperantistaro certe povos pligrandiĝi. Tre grava estas la fakto, ke mian lernolibron oni povos (ni esperu) aĉeti en kutimajlibrovendejoj. Ekzistas granda ŝanco, ke iu vidante sur magazena breto la lernolibron, rememoros la lingvon internacian kaj deziros ĝin lerni.

KL: — Kion vi konsilus por aliaj junaj homoj rilate al lernado de Esperanto?

MZ: — Ekzistas multaj lernometodoj. Ĉiu devas mem elekti por si la plej ĝustan. Mi kore rekomendas tradukadon. Mi komencis traduki jam kiel komencanto. Mia instruistino korektadis miajn tradukojn kaj tiel mi eksciadis, kion mi ankoraŭ devas lerni. Unue mi faradis tre multe da eraroj, poste pli kaj pli malmulte. Por mi tiu metodo montriĝis la plej utila. Por aliuloj ĝi povas tamen tute ne taŭgi.

Se temas pri uzo, ŝancoj ne estas egalaj. Se oni loĝas en urbo, en kiu ekzistas E-klubo, oni povas fariĝi ties membro. En mia urbo ne ekzistas E-klubo, sed mi ĝuas la Interreton. Se iu povas nek fariĝi membro de E-klubo, nek uzi la interreton, la solaj eblecoj por uzi Esperanton estas abonado de E-revuoj, korespondado kaj radioelsendoj.

KL: — Koran dankon por la intervjuo!

la rubrikon gvidas Zofia BANET-FORNALOWA

Denove malfavora periodo por la Lingvo Internacia

(daŭrigo el la antaŭa numero)

Estis jam dirite, ke organiza laboro de la Asocio estis diversflanke malhelpata flanke de la administraj instancoj. Pri tio atestas revokoj de planataj renkontiĝoj, ankaŭ neblo eldonadi „Polan Esperantiston”, kiun provis sufiĉe sukcese anstataŭi hektografe eldonataj bultenoj. Tamen, verŝajne pro alta rekono, kiun ĝuis kelkaj Esperanto-aktivuloj, kiel ekz. Jan Zawada kaj Bolesław Czechowski, ligitaj en intermilita periodo kun socialista movado, kaj en Popola Pollando funkciantaj kiel altrangaj ŝtataj oficistoj, ankaŭ danke al prudenta kaj saĝa agadmaniero de Ĝenerala Sekretario de la Asocio, Isaj Dratwer, oni kapablis fojfoje aranĝi signifajn por daŭro de la Movado renkontiĝojn.

Tia okazis la 2an de decembro 1951 (tiun jaron oni povas konsideri kiel apogeo de stalinismo). Tiutage debatis en Varsovio Konsilio de Asocio de Esperantistoj en Pollando. Partoprenis ĝin membroj el Varsovio, Łódź, Sosonowiec, Gdańsk, Przemyśl, Wrocław, Katowice, Biel-

sko, Nowa Sól kaj de kelkaj aliaj lokoj.

Enkondukon al la debatoj faris vicprezidanto de AEP, B. Monkiewicz. Raporton pri la agado de la socio prezentis ĝenerala sekretario I. Dratwer. La raporto kaj kelkaj rezolucioj pri organiza laboro estis de kunvenintoj akceptitaj.

Inter la rezolucioj troviĝis ankaŭ tiu, kiu alvokis la mondan esperantistaron al vicoj de pacbatalantoj, kaj la polojn al aktiva agado por realigo de la 6-jara ekonomi-politika plano... Akcepto de ĉi-specaj rezolucioj okazis tiutempe kadre de ĉiuj okazintaj kunvenoj de ĉiuj funkciantaj asocioj.

La kunvenintoj alvokis al mendoj de pol-esperanta vortaro kaj al posttempa abon-pago por „Tra la Mondo kaj Literaturo”.

Laŭ la decido de kunvenintoj la informoj pri okazintaj debatoj estos transdonitaj en januara (1952) cirkulero. Nepras ĉi-loke menci, ke inter la rezolucioj, kiuj estis unuvoĉe akceptitaj dum la kunveno de la Konsilio, troviĝis tiu pri aktivado en vicoj de pacbatalantoj.

Ĝuste kadre de la pacbatalaj grupiĝoj troviĝantaj vaste en diversaj lokoj de la lando (same okazis en aliaj t.n. socialismaj landoj) estis fojfoje entreprenita poresperanta aktivado kaj konsolis la fakto, ke animantoj de tiaj iniciatoj estis junularo. Ĉi-rilata informo troviĝas en n-ro 7-9 (julio-septembro) 1951 de la revuo. De ĝi oni ekscias, ke fine de la jaro 1950 dum la kunveno de ZMP (Asocio de Pola Junularo) en Głuchołazy (Malsupra Silezio) oni fondis Eksterlandan Fakon por korespondi kun progresivaj pacbatalantoj el la tuta mondo. Oni dissendis plurajn leterojn en 5 lingvoj: la angla, franca, germana, rusa kaj Esperanto, kaj... nur en Esperanto oni ricevis respondojn el pluraj landoj. Tial oni ne plu skribis en aliaj lingvoj, sed decidis lerni Esperanton kaj korespondi daŭre en tiu lingvo. La ricevitaĵojn Esperantajn leterojn oni prezentis dum la junulara kunveno en loka fabriko.

Al la Internacia Junulara Festivalo en Berlino, okazonta en aŭgusto 1951 oni transdonis la standardon kun Esperanta surskribo: „Antaŭen al III Tutmonda Festivalo de Junaj Pacbatalantoj”. La foton de la standardo prezentis „Heroldo de Esperanto” en n-ro 1146, aldoninte mallongan notaĵon kaj adreson de fervora poresperanta aganto — Jan Rezner, por ke oni sendu al li korespondataĵojn.

134 En postaj numeroj de la revuo

troviĝas daŭraj informoj pri laŭdinda aktivado de junularo ĉi-loke, inter alie pri organizita Esperanto-ekspozicio, kserografie pretigita portreto de L. L. Zamenhof, kiujn oni povas de li havigi, kaj similaj informoj.

„Tra la Mondo kaj Literaturo” aperadis en plej malfacilaj jaroj. En la jaro 1953 la asocia revuo ŝanĝis sian titolon je „Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando” kaj subtitole estis anoncote, ke ĝi enhavas kreostomation de Esperanta literaturo por gelernantoj de korespondatakurso de Esperanto. Videble, kun tia subtitolo estis pli facile ĝin eldonadi. Redaktis ĝin la sama redakta komitato (do ĉefaktivuloj el Varsovio). Ekde la fino de 1953 la situacio malrapide, sed iom post iom fariĝis pli favora por aktivado de sociaj organizaĵoj. Tiu faktoro ligiĝis kun morto de Stalin kaj sekve ioma malstreĉiĝo praktika. Decidan influon je demokratigo de socipolitikaj rilatoj en la Orienta bloko havis trapaso de la XX Kongreso de Komunista Partio en Sovetio, okazinta en 1956 jaro. Dum ĝi la stalinisma reĝimo estis subugita al esenca kritiko.

Ne rapide tamen okazis decidaj ŝanĝoj en Esperanto-movado en landoj al tiu reĝimo subugitaj. Analizo de kaŭzoj de tiu fenomeno postulas abundan, diversflankan eson. Tamen difnante la problemon ĝenerale oni devas konstati, ke malfortigita (pro perdo de la grandpar-

to de E-aktivularo dum la nazi-germana okupado de Pollando) la renaskiĝanta pola Esperanto-movado konsistis en sia parto de novaj malspertaj, ofte junaj esperantistoj, kiun la reĝimo kapablis de ĝi malallogi, ofte eĉ timigi...

Aliflanke, nemultaj komprenis pri nepro plene apogi la sindonan aktivularon en ties dediĉa laboro. Tio klare evidentiĝis en plurfojaj alvokoj, petoj de la redakcio, ke oni abonu la revuon, ĉar kiel estis skribite en 1950, 1951 „oni ankoraŭ ne akiris 200 abonantojn”. Poste, kaj tio rilatas kaj „Tra la Mondo...” kaj la „Bultenon” la situacio ne multe ŝanĝiĝis. Tiukaŭze la redakcio senĉese troviĝis en financa krizo, malebliganta plialtigon de aspekto de la revuo.

La samo rilatis mendojn de pol-esperanta vortaro, kiun oni volis lanĉi jam meze de 1950. Nepris bedaŭrinde prokrasti tiun gravan entreprenon pro manko de abonantoj, ne sufiĉe pri ĉi-ĝrava afero interesitaj, kaj ankaŭ poste nur ne pluraj pretis alpagi al abonprezo por la revuo, por ricevi la vortaron.

Ĉi-loke trudiĝas amara asociigo; ĉu nun, kiam post preskaŭ dudekjara interrompo en la aperado de „Pola Esperantisto” ĝi reaperis, danke al idealisma fervorulo kaj apoganta lin areto da homoj konsciaj pri graveco de la revuo por la Movado, la anaro sufiĉe ĝin apogas, almenaŭ per abonado kaj nepra, konscia kunlaboro?...

La samo rilatas aliajn kampojn de la aktivado, kiel. ekz. aĉetado de libroj, ĉeestado en kultur-klerigaj aranĝoj, konservado kaj riĉigado de nia historia kaj intelekta heredaĵo (arĥivoj, bibliotekoj)... Ŝajnas, ke ĉi tiu temo indas apartan kajeron de „Pola Esperantisto”.

Mi tamen deziras fini optimismige. En tiu ĉi artikolo estis menciitaj kelkaj nomoj de Samideanoj, dank’ al kiuj la Movado povis tradaŭri sufiĉe malfacilan periodon en jam renaskiĝita Pollando. Tiuj nomoj estas sufiĉe, almenaŭ por pli maljuna generacio, konataj. Sed tutcerte nur malmultaj scias, kiu dum tiu streĉa periodo devis venki ĉiujn teknikajn malfacilaĵojn, por ke la revuo povu regule aperadi: ĉiujare 12 n-roj, ĉefe ĉiumonate, sed nur escepte po 2 n-roj kune.

Temas pri s-ano Stanisław Roman, kiu funkciis tiam en la Ĉefa Estraro de AEP kiel teknika sekretario. Ĝuste li plenigis ankaŭ tiun funkcion en la Redakta Komitato. Li loĝis tiam en Otwock apud Varsovio, ĉe strato Warszawska 20 loĝ. 6.

Al tiu adreso oni petis sendi abonpagon, ankaŭ materialojn por la revuo, same alpagon por pol-esperanta vortaro, publikigota po parte. Plejverŝajne li faris la tutan teknikan laboron: hektografiadon kaj dissendadon plenumis li mem en sia loĝejo.

Stanisław Roman estis malnova esperantisto. Multe diranta estas la

informo pri li, troviĝanta en „Adreslibro de Pollandaj esperantistoj” sub Mława, prilaborita kaj eldonita de Jan Zawada en 1931. Stanisław Roman naskiĝis la 24an de majo 1909 en Varsovio kaj estis esperantisto ekde 1928 j. Li konatiĝis en Mława kun advokato Roman Sakowicz, kiu tiutempe deĵoris tie kiel juĝisto. Rilatoj kun tiu pionira esperantisto, homo tre klera, tutcerte bone influis lingvo-nivelon kaj ne nur de juna esperantisto. Interesa estis la informo, per kiu li sin prezentas en s.m. Adreslibro: „...4 gimnaziaj klasoj; polo, studanto de Sankta Skribo, abonanto de „Pola Esperantisto”, k. „Heroldo”, senpartia esperantisto depost 1928; deziras korespondi pri Paneŭropa Unio, vera Krista religio, pri tuta universo kaj ĝiaj principoj”.

Ne mirige, ke homon kun tia vasta mondkoncepto allogis la Lingvo Internacia. Lia nomo troviĝas ankaŭ en „Bulteno de la Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj” eld. de Zawada en 1935, sed tiam S. Roman jam loĝis en Varsovio.

Dummilite li estis izolita de la Movado, sed nelonge post ĝia fino li ekaktivis, kaj — kiel skribite — respondecas kaj tre sindone laboris kiel teknika sekretario de la Ĉefa Estraro kaj kadre de sia funkcio decide kontribuis pere de pretigo de la revuo en la jaroj 1950–1956, por daŭrigo kaj esenca subteno de la Movado. Ekde 1962 li estis membro de Sinjora Rondo kaj tiutempe li ne

multe aktivis por Esperanto. En la 60aj jaroj li ekloĝis en Krościenko ĉe Dunajec. De tiu tempo oni malmulton pri li aŭdis.

Por grava kontribuo al la Movado la Ĉefa Estraro de AEP proponis al la ŝtataj instancoj honorigi lin per distingo.

Li mortis la 14an de junio 1998 en Otwock, kie estis entombigita apud sia edzino Alicja, mortinta du jarojn pli frue. Ĉar ambaŭ havis laikan entombigon (kvankam en romkatolika tombejo), estis ege malfacile trovi iun informon pri ili.

Valoras ne forgesi pri ĉiuj, kiuj aktivis en malfacila periodo, kiuj ĉiuforte laboris por subteni Esperanton kaj disvastigi idearon, kies portanto ĝi estas, kaj inter tiuj Stanisławon Roman. Ili plene tion meritas.

Nur en oktobro 1957 en multe pli favoraj politike kondiĉoj renaskiĝis „Pola Esperantisto”, kiel dumonataĵo. Tiu periodo de „Pola Esperantisto” estos traktata en daŭriga parto, rilatanta polan Esperanto-historion.

Zofia Banet-Fornalowa.



Ĝus aperis nova libro de Zofia Banet-Fornalowa: *La Pereintoj In Memoriam*, dediĉita al kvin famaj heroj esperantistaj. Pli da informoj vi trovos en la 6a numero de PE.

Jan Nieciŝlaw Baudouin de Courtenay

Amiko de Esperanto

Mi estas nek esperantisto, nek adepto de ia ajn alia internacia helplingvo. Neniun el ili mi konas tiel bone, ke mi regu ĝin libere. Tamen mi komprenas Esperanton, mi legas sen malfacilo ĉiujn tekstojn ĉilingvajn kaj ankaŭ mi komprenas uzantojn de ĝi dum buŝa interparolo. (...) Mi estas nek fanatikulo nek absoluta partizano de iu artefarita lingvo internacia. Mi estas nur objektiva kritikanto.

Tion konfesis la homo, pri kiu Leo Belmont en la *Rememoro funebra* publikigita en *Pola Esperantisto* asertis, ke ĉi tiu homo sendube meritas varman kaj honoran folion en la gazetaro de tutmonda Esperantistaro. Kaj Belmont tute pravis — **Jan Nieciŝlaw Baudouin de Courtenay** indas senĉese resti en dankamemoro de ĉiuj adeptoj de la lingvo internacia, kaj precipe de uzantoj de la kreaĵo de L.L. Zamenhof. Tamen oni devas konstati iom pli ĝenerale — meritas rememori silueton de la sciencisto ne nur pro liaj sciencaj atingoj, sed ankaŭ pro liaj personaj ecoj: honesto kaj senĉesa strebo al vero.

Vivokuro skize

Jan Nieciŝlaw Baudouin de Courtenay naskiĝis la 13an de marto 1845 en Radzymin apud Varsovio kiel la plej aĝa elinter dek du idoj de Aleksander kaj Jadwiga, naskita Dobrzyńska. La familio Baudouin de Courtenay devenis en Francujo, sed jam de generacioj ĝi estis enradikiĝinta en Polujo. Lia patro partoprenis la „novembran ribelon“ en 1830, poste estis termezuristo en Radzymin. Ekde 1862 Jan Nieciŝlaw studis filologion ĉe la varsovia Szkoła Główna (La Ĉefa Lernejo), kiu poste fariĝis la varsovia universitato. Liaj kolegoj estis Lucjan Malinowski (1839–1898) kaj Adam Kryński (1844–1932) — poste elstaraj lingvistoj. En 1866 li finis studojn kaj magistriĝis. Kiel talentulo li ricevis registaran stipendion por eksterlande profundigi sian scion. Li vizitis Pragon, Jenon kaj Berlinon. En 1868 aperis lia unua scienca laboraĵo titolita *Kelkaj kazoj de ago de analogio en la pola deklinacio*. Reveninte Varsovion Baudouin de Courtenay eksciis, ke la aŭtoritatoj ne postenigos polon ĉe la universitato. Do li komencis labori ĉe la universitato en

Petersburgo. En 1870 por mallonga tempo Baudouin de Courtenay vizi- tis Lejpcigon, kie ĉe la universitato li doktoriĝis surbaze de la supre men- ciita laboraĵo. Samjare en Lejpcigo estis eldonita ruslingve lia libro *Pri la malnova pola lingvo ĝis la XIV jar- cento* komenciganta scienca esplon de historio de la pola lingvo. Surbaze de ĉi disertacio li estis no- mumita docento pri kompara gra- matiko de indoeŭropaj lingvoj ĉe la petersburga universitato.

Ekde 1874 li laboris ĉe la univer- sitato en Kazan (Centra Rusujo) kiel docento kaj poste profesoro pri gra- matiko de indoeŭropaj lingvoj. Tie kune kun profesoro Mikołaj Kru- szewski (1851–1887) li fondis kona- tan en Rusujo t.n. „kazanan lernejon lingvistikan”. En 1883 Baudouin de Courtenay tranlokiĝis al Dorpat por ĉe tiea universitato gvidi katedron pri kompara gramatiko de slavaj lin- gvoj. En la jaroj 1894–1899 li estis profesoro pri komparalingvoscienco kaj sanskrito ĉe la Jagiellona Univer- sitato en Krakovo. Pro maldaŭrigo de kontrakto fare de la aŭstria mini- stero pri edukado Baudouin de Co- urtenay revenis Petersburgon, kie li lekciis ĉe la universitato ĝis 1918. Tiam li ne hezitis aktivi en la medio de peterburga polaro. Li prezidis estraron de la fondita en 1915 en Pe- tersburgo Societo por Apogi Polan Popolan Teatron. Post renaskiĝo de la sendependa pola ŝtato Baudouin de Courtenay revenis patrujon kaj

nomumita profesoro de la varsovia universitato aktivis ĝis sia forpaso la 3an de novembro 1929.

Profesiulo

Baudouin de Courtenay estis ak- tiva lingvosciencisto dum sesdeko da jaroj. Sian sciencobranĉon li difi- nis jene: *Kiel indikas la nomo mem, lingvoscienco estas konado kaj scien- ca esplorado de lingvo, t.e. de la homa parolo en ĝia tuta diverseco*. Entute li verkis ĉirkaŭ 300 laboraĵojn. Imagon pri liaj sciencaj interesiĝoj donos al ni kelkaj titoloj de liaj publikaĵoj. Krom la supre menciitaj al la plej gravaj apartenis: *Pri ĝeneralaj kaŭzoj de lingvaj ŝanĝoj* (1891), *Provo de teorio pri fonetikaj alternecoj* (1894, germanlingva versio 1895), *Kom- para gramatiko de slavaj lingvoj lige kun aliaj indoeŭropaj lingvoj* (1902), *Pri psikaj fundamentoj de lingvaj fe- nomenoj* (1903), *Lingvosciencaj ski- zoj* (1904), *Skizo de historio de lin- gvoscienco* (1909), *Pri „voĉaj leĝoj”* (1910), *Skizo de historio de la po- la lingvo* (1922), *Influo de lingvo sur mondkoncepto kaj humoro* (1929). Laŭ la opinio de Stanisław Urbań- czyk Baudouin de Courtenay estis *la unua pola lingvosciencisto*. Senhezi- te oni devas aldoni — ankaŭ elstara kaj meritplena.

Marĝene indas mencii, ke Bau- douin de Courtenay partoprenis ankaŭ diskuton pri pollingva kemia nomenklaturato. En la eldonita en la 1900 jaro en Krakovo dudeksepaĝa

broŝuro *La voĉo de la akademiano J. Baudouin de Courtenay en la afero de la kemia nomenklatur* li rilatis al la samjare aperigita en Varsovio broŝuro de Antoni Grabowski *Pola kemia nomenklatur*. La lingvisto fine de sia verketo konkludis, ke kemiistoj mem devas solvi problemojn de faka lingvo konforme al necesoj de sia sciencobranĉo.

Verkoj de Baudouin de Courtenay ne nur restas disjetitaj en revuoj, gazetoj aŭ broŝuroj. Feliĉe en la jaroj 1974–1986 la Ŝtata Scienca Eldonejo aperigis sesvolumajn *Elektitajn verkojn*, kiuj ampleksis kaj liaj sciencajn studaĵojn kaj publicistajn publikaĵojn. Menciindas ankaŭ, ke en septembro 1979 en Varsovio okazis internacia konferenco *Jan Nicisław Baudouin de Courtenay kaj la monda ligvoscienco*, dum kiu estis prezentitaj multaj referaĵoj, kies aŭtoroj analizis verkaron de la sciencisto kaj lian influon sur evoluo de ligvosciencaj esploroj. Valorakolekto de diverslingvaj referaĵoj estis poste eldonita libroforme de la Pola Akademio de Sciencoj.

Honestulo, liberpensulo kaj publicisto

Elstara lingvisto profesoro Kazimierz Nitsch (1874–1958) esprimis opinion, ke Jan Baudouin de Courtenay dum sia tuta vivo batalis por vero, kaj en scienco kaj en vivo. Laŭ prof. Nitsch la „januara ribelo“ en 1863 kaj ĝiaj konsekvencoj por po-

loj, kiujn Baudouin de Courtenay mem spertis, iĝis lin *socie radikala, religie kaj nacie varmega defendanto de ĉiaj sinceraj konvinkoj, pasia malamiko de ĉia persekutado de homoj pro iliaj ideoj*. Sed ne nur pro ideoj, ankaŭ pro religio aŭ nacieca deveno. Li kondamnadis persekuton de religiemuloj flanke de ne religiemuloj. Komence de la dudekaj jaroj precipe indignigis lin *amasa konvertigo al senreligieco* okazanta en Sovetunio, kie la ebleco labori kaj sin vivteni dependis de la deklaro pri nekredo je Dio. Li skribis: *Fervorege mi defendas (...) rajtojn kredi je Dio aŭ konfesia aŭ eksterkonfesia, mi defendas ilin* (t.e. konfesuloj — aldona mia A.W.) *kontraŭ atenco flanke de alikonfesiaj trompantoj kaj kontraŭ teroro de stultaj ortodoksaj „senreligiuloj“*. Pri intertnaj rilatoj Baudouin de Courtenay opiniis: *Se ekzemple hungaroj aŭ prusoj premas „fratojn-slavojn“, mi staras flanke de slavo. Sed se „fratoj-slavo“ premas kaj persekutas germanojn, finnojn, svedojn, litovojn, armenojn, judojn, ĉinojn ..., mi tutanime staras flanke de subpremitoj*. Kaj aliloke li esprimis sin jene: *Pritakso de homoj ne laŭ iliaj meritoj, sed laŭ ilia deveno, pruvas kaj malsaĝigon kaj malaperon de morala kaj civitana senso*. Ne mirigas do la farita en la 1922 jaro de naciaj minoritatoj propono kandidatiĝi Baudouin de Courtenay-n al la posteno de ŝtata prezidento.

Jan Baudouin de Courtenay es-

tis defendanto de vivo. Lian sintenon ĉirilate esprimitan en la *Neoportunistaj pensoj* oni povas resumi mal-longe: neniun, neniam, neniel, nenie mortigu (vidu flanke). Tiukaŭze li kontraŭis kaj militojn kaj mortopunon. Baudouin de Courtenay kondamnadis militon, ĉar ĝi *povas vo-ki nur timegon kaj abomenon*. Laŭ li nura escepto estas nur defenda milito, kies bona ekzemplo estas la milito inter Pollando kaj Soveta Rusujo en la 1920 jaro. (...) *nur tiaj ĉi militoj estas pravigeblaj*. Ĉiaj aliaj estas krimego, kaj dresado de „dugamba brutaro” en la arto de mortigado kaj neniigado estas ankoraŭ pli granda perforto ol altrudado de tiu aŭ alia konfeso al nekredantoj. Tial li kritikis faman verkiston Stefan Žeromski, aŭtoron de *La Cindroj*, pro liapluma priskribo de heroaj agoj de la pola armeo batalanta sub la gvido de Napoleono kontraŭ hispanoj. Same li kontraŭis mortopunon, eĉ en la kazoj, kiam ĝi ŝajnis justa. Ekzemple li opiniis mortopunon malĝusta por Eligiusz Niewiadomski, kiu atence mortigis prezidenton Gabriel Narutowicz. *Korojn de homamasoj flamigas ne amo, sed malamo kaj sangoavido* konstatis li en la *Neoportunistaj pensoj*. Du vortoj „Ne mortigu” estis por ĉi liberpensulo ne la kvina ordono, sed la ĉefa.

Dum tuta vivo Baudouin de Courtenay strebis al vero, pensis libere, kvazaŭ ne adaptiĝadis al

forpaso li kuraĝe esprimis jenan opinion: *Al la vere libera penso ne estas permesite esti sklavo de iu ajn partio, de iu ajn socia klaso, de iu ajn popolo, de iu ajn potenculo unukapa aŭ plurkapa, de iu ajn religio, eĉ se ĉi religio estus fanatika senreligieco. Kaj ĝuste „la disciplinita kaj organizita penso” perfekte taŭgas por plenumado de tiaj ĉi sklavaj servoj. (...) Ĝenerale ĉia amasa liberpensado estas utopio kaj simple sensensaĵo. Homamaso neniam povas pensi libere kaj sendepende. La libera penso povas esti nur eco de unuopa animo. Estas absurdaĵo kunigi taskojn de liberpensado kun interesoj de „aristokrataro”, aŭ de „demokratio”, aŭ de „burgaro” aŭ de „laborista klaso”. Kaj aliloke li substrekiis, ke la vera liberpensado, la vera demokratio, la vera altruismo — estas eblaj nur en reciproka kuniĝo. Kompreneble sendependeco de la profesoro, kiu pasie batalis por tio, kion li opiniis ĝusta, fariĝis neŭtralan rilaton al li neebila.*

Fine de la 1897 jaro en Krakovo li verkis broŝuron titolitan *Unu simptomo de oportunistama-ortodoksa moraleco*. Ĝi estis dediĉita al „fajsje” — ĝenerale konata en Galicio kutimo deklari malpli grandan lupagon ol la vere interkonsentita kun la posedanto de la rentodomo, por ke li pagu malpli grandan imposton. Baudouin de Courtenay opiniis ĉi agon simpla trompo kaj mensogo kaj kontraŭstaris al ĝi, kvankam oni klarigis al li, ke neniu luigos loĝejon

al la homo, kiu ne obeus ĉi kutimon. Baudouin de Courtenay plene konsciis, ke lia voĉo ne ŝanĝos la kutimon. Tial li finis jene: *Mi prezentis ĉi broŝuron, ĉar mi ne povis malprezenti ĝin, ĉar tion ordonis al mi mia konscienco. Tamen mi ne iluziiĝas, ke mia ago efikos praktike.*

Baudouin de Courtenay estis elstara publicisto, nuntempe komparata de fakuloj kun la ĉefa reprezentanto de pola pozitivismo — Aleksander Świętochowski (1849–1938). Baudouin verkis ĉirkaŭ 200 publicistikajn artikolojn kaj kontribuis al 50 revuoj (ekzemple: *Nowiny, Kraj, Przegląd Tygodniowy, Gazeta Polska, Kurier Nowy, Myśl Wolna*). Krome kelkaj laboraĵoj estis aparte eldonitaj broŝurforme: *Neoportunistaj pensoj* (Krakovo 1898), *Unu simptomo de oportunistama–ortodoksa moraleco* (Krakovo 1898), *Propagandistoj de sovaĝiĝeco* (Krakovo 1905), *Nuntempa edukado kiel senĉesa kaŭzo de nervozigo* (Varsovio 1912), *Nacia kaj teritoria signo en aŭtonomio* (Petersburgo 1913), *Konfesiaj kaj eksterkonfesiaj edziĝoj kaj divorcoj* (Varsovio 1926), *Mia rilato al Eklezio* (Varsovio 1927).

Verkisto kaj publicisto Stefan Krywazewski (1866–1950) karakterizis Baudouin de Courtenay–n baziĝante sur propraj kontaktoj kun li: *Profesoro Baudouin de Courtenay skribaĉis senfine longajn artikolojn, tamen redakcioj malvolonte ilin presis; ĉi ellaboraĵoj estis malkonci-*

zaj kaj sufiĉe mallertaj, malgraŭ ke en ili troviĝis kuraĝa penso kaj scienca fundamento. Estis danĝere renkonti Baudouin, ĉar li portis manuskriptojn enpoŝe. Montriĝas, ke alian perspektivoj havas samtempulo, kaj tute alian — postaj esploristoj.

En iu artikolo Baudouin de Courtenay konfesis: *Neniam mi estis kaj povis esti hipokritulo. (...) Mi volas resti mi mem, kaj ne ia surogato de propra persono.* Kompreneble tia sinteno kostis perdon de katedro en Krakovo, malliberigon en Petersburgo pro publikigo de la broŝuro *Nacia kaj teritoria signo en aŭtonomio*, transportadon en brutvagono al Pollando post venko de la oktobra revolucio en Ruslando. Kaj por resumi la sintenon de la *plej honesta inter honestuloj* ankoraŭ unu citaĵo. *Li homamulo, patrioto sen ŝovinismo, estis tamen pli vera kristano en koro, ol mil miloj de tiuj, kiuj estas enterigataj kun kruco portata antaŭ la procesio funebra... Kaj ankaŭ — li estis pli ol unufoje alkrucigita dum sia vivo* skribis Leo Belmont en la jam supre citita *Rememoro funebra pri prof. Jan Baudouin de Courtenay.*

Problemo de internacia lingvo

Teresa Dobrzyńska analizante rilaton de Baudouin de Courtenay al lingvo internacia substrekas, ke li estis entuziasmulo de la ideo pri internacia lingvo, kaj ne — de ia difinita lingvo. Konsciante pasantan, maldaŭran karakteron de ĉiuj homaj

inventoj, li el ĉiuj diversaj lanĉitaj proponoj de internaciaj lingvoj plej alte aprezis Esperanton. Sed, kiel pruvas la citaĵo komence de la artikolo, li volis objektivite, sciencmaniere esplori la problemon. Por doni imagon pri rezultoj de ĉi esploro, ni citu lian opinion troviĝantan en la artikolo *Porównanie języków „naturalnych“ z językami „sztucznymi“* publikigita en 1909 en *Pola Esperantisto: Ĉiuj elementoj de la lingvo Esperanto kaj aliaj ĉispecaj lingvoj „artefaritaj“ estas prenitaj el „vivo“*. Ili estas lingvoj niaj, lingvoj de la arja-eŭropa, romanika-germana-slava pensado. Do ĉispeca lingvo „artefarita“ havas ĉiujn ecojn de vera lingvo. Kaj poste li aldonas: *La lingvon Esperanto karakterizas preskaŭ absoluta klareco, fremda al naturaj lingvoj*. Samjare en *Pola Esperantisto* Baudouin de Courtenay aperigis alian artikolon titolitan *Riproĉoj farataj al la lingvoj internaciaj ĝenerale kaj al Esperanto aparte*. Li ne evitadis ankaŭ ĝeneralajn revuojn. Ekzemple en 1908 en la revuo *Krytyka* aperis lia ampleksa, triparta studaĵo *Pri la internacia helplingvo*, kiu en formo de publika prelego estis aŭdigita la 5an de majo 1908 jaro en Varsovio. Precipan valoron havas lia *Kritiko de artefaritaj mondlingvoj* publikigita en la revuo *Annalen de Naturphilosophie* en Lejpcigo.

Kiel sciate Baudouin de Courtenay estis vicprezidanto de la komitato de la „Delegacio por alpre-

no de Lingvo Internacia“. Prezidis la komitaton mondfama kemiisto kaj Nobelpremiito (1909) Wilhelm Ostwald. *Hieraŭ finiĝis kunsidoj de la komitato elektita de la Delegacio, kiu establiĝinte en la 1900 jaro, celas finan solvon de la afero* (de la lingvo internacia — aldono mia A.W.). Per tiu ĉi frazo datita *Parizo, la 25an de oktobro 1907* Baudouin de Courtenay komencis la publikaĵon titolitan *La internacia helplingvo*. Ĝi aperis en la 40a numero de la eldonata ekde 1882 en Petersburgo pollingva revuo *Kraj*. La artikolo, daŭrigita en sekvaj numeroj de la revuo (ĝis la 45a), estis kvazaŭ raporto de la sciencisto pri laboro de la komitato. Baudouin de Courtenay plene komprenis gravan rolon de lingvo internacia. En la karakteriza por li, senkompromisa maniero, li skribis: *La internacia helplingvo faros por senarmigo kaj pacigo de la reciproke kontraŭ si insidantaj ŝtatoj kaj nacioj multe pli ol ĉiuj kunsidoj de hipokrituloj organizantaj packonferencojn en Hago, kaj proprahejme persekutantaj ĉiajn lingvojn kaj neniigantaj ĉiajn naciecojn*. Kaj aliloke li substrekis: (...) *efektivigo de la ideo pri internacia lingvo apartenus al la plej grandaj kaj bonfaraj inventoj de niaj tempoj*. Por esperantistoj ne estas bezonate priskribi rezultojn de laboroj de la Delegacia Konstanta Komisiono, el kiu cetero li eksciis en 1908 post lanĉo de *Ido*. Tute margene mi citos nur unu frazon el la membiografio de

Wilhelm Ostwald, kiu esprimis pri la samkomitatano jenan, malican opinion: *Li prezentis kuriozan etnografian miksaĵon, ĉar malgraŭ sia franca nomo li estis norddevena kaj aspektis kiel ido de unu ankoraŭ ne tute asimilita kulture tribo de Ruslando.* Do, eĉ profesoro, supozeble kultura homo, ne hezitis postlasi tiajn vortojn...

Laŭ Baudouin de Courtenay Esperanto kaj aliaj planlingvoj estis por sciencisto kaj esploraĵoj kaj esploringvaj homaj kreaĵoj. Li klare asertis: *Lingvistiko devas entiri en sian esplorkampon ankaŭ analizon kaj pritakson de artefaritaj lingvoj.* Ŝajne sen li Esperanto ne estus prezentata nuntempe kiel ekzemplo de interlingva artefarita en lingvosciencaj verkoj (komparu Adam Weinsberg *Językoznawstwo ogólne*, Warszawa 1983).

Kaj ankoraŭ unu interesaĵo koncerne Baudouin de Courtenay kaj Esperanto. Sur la titolpaĝo de la Internacia Scienca Revuo redaktita esperantlingve de Paul Fruictier troviĝas informo, ke *P-ro Baudouin de Courtenay, profesoro en la Petersburga Universitato, el la Krakova Scienca Akademio* apartenis al Patronaro de la revuo. Ne sciate detale, kian rolon li ludis inter patronoj de la revuo.

Léon Courtinat en la *Historio de Esperanto* (p. 692) nomis Jan Nieci-sław Baudouin de Courtenay-n *amiko de Esperanto*. Prenante sub konsi-

deron agadon de la Profesoro oni ne rajtas dubi pri ĝusteco de la opinio.

Andrzej Warszawski

Baudouin de Courtenay

Neoportunismaj pensoj

(elekto)

Nenio kompromitas tiel la homon, kiel sincereco.

Arto de vivo ofte konsistas en tio, ke oni ne malkaŝu intelekton antaŭ homoj.

Unu el la plej ofte renkontataj kaj nekureceblaj malsanoj estas frenezo pri grandeco kaj senerareco.

Plejparto de homoj troviĝas en la stato de daŭra mallumigo de intelekto.

Ne strebu al konscio, ĉar ĝi venenigos vian vivon montrante, ke vi estas aŭ krimulo aŭ ĝismorta kondamnito.

Plej certas akcioj de homa malsaĝeco. Entreprenejoj kaj societoj bazitaj sur ĉi akcioj ekzistas eterne.

Celeco de la naturo laŭ vipunkto de kulo: homoj kaj aliaj varmsangaj bestoj ekzistas por ebligi per ilia varma sango demeton de ovo al niaj edzinoj, sinjorinoj kulinoj.

Ju pli da reguloj kaj ritoj, des malpli da loko por individuaj virtoj.

la rubrikon gvidas Zbigniew GALOR

Vendistoj de espero

Ne nur la somero mem estas nun escepta — pro nekutima varmego kaj sekeco, sed ankaŭ la «kukuma periodo» en gazetaro iĝis tute escepta: ĝi pli malgrandiĝis aŭ preskaŭ malaperis (influo de la eventoj en Irako). Tio kompreneble diverse aspektas depende de karaktero de gazetoj kaj eblecoj de ĵurnalistoj.

En neesperanta gazetaro oni de tempo al tempo publikigas artikolojn pri Esperanto, plej ofte dum somera periodo kutime pli libera de gravaj eventoj. Informoj pri la lingvo de Zamenhof kaj esperantistoj ricevas tiam — vole ne vole — «kukuman», ne tro seriozan kuntekston. Aliflanke akompanas tion priskriboj de la Esperanta medio el egzotika, sensacia, iomete primitiva perspektivo. En pola revuo *Forum* (n-ro 31, 2003) mi trovis artikolon, kiu rompas «kukuman» praktikon de la ĵurnalista prezentado de Esperanto. La artikolo *Łacina szarego człowieka* estas pola traduko de la teksto de David Newsham aperinta en la sendependa maldekstra brita gazeto *The Guardian* (18.07.2003).

nin certa surprizo: titoloj de la sama artikolo en la enhavtabelo kaj super la teksto mem en la revuo estas tute aliaj. En la enhavtabelo ni legas: **Esperanto. Klęska sztucznego języka** (**Esperanto. Katastrofo de artefarita lingvo**) kaj interne: **Esperanto. Łacina szarego człowieka** (**Esperanto. Latino de «griza homo»**). Du titoloj — du kontraŭdiraj perspektivoj. Ĉe manko de origina angla titolo, ni povas klarigi la diferencon pere de du ĵurnalismaj aliroj por vendi ideon de Esperanto. Tio signifas, ke lingvon ni traktas ĉi tie kiel varon, kun ĝia loko en lingva merkato, kun nivelo de bezono kaj oferto, kun vendadmanieroj, reklamado ktp.

La titolo anoncanta katastrofon de artefarita lingvo estis probable planita far redaktoroj de la pola *Forum* kiel ĝusta por «kukum-perioda» prezentado de artikolo de D. Newsham. Sed pro ia redakta eraro ĝi restis nur en la enhavtabelo kaj verŝajne la origina titolo pri latino de «griza homo» restis neŝanĝita. Kukum-katastrofa aliro al la lingvo de Zamenhof flanke de la pola redakcio estas kontraŭa al la aliro de

D. Newsham. Li karakterizas faktojn favorajn kaj nefavorajn al Esperanto. Li faras tion el objektiva perspektivo, libera de antaŭjuĝoj pri katastrofo kaj senvaloreco de la lingvo.

La espero de *Forum* redaktoroj signifas esperon je fino de Esperanto kiel artefarita lingvo. La espero de Newsham estas espero je evoluo de Esperanto almenaŭ en kelkaj kulturaj enklavoj en la mondo. La vendistoj ne vendas do la saman esperon.

En la komenco de sia artikolo Newsham skribas, ke Zamenhof pri laboris simplan kaj belan lingvon, celante pacan kaj konkordan kunvivon de la homoj en la mondo; kaj tuj demandas: «Do, kial la mondo ne volas paroli Esperante?» Senperan respondon ni ne trovos en la teksto. Ĝin eblas trovi tamen en karakterizoj de la lingvo. La mondo ne volas paroli Esperante, ĉar ecoj de la proponata lingva varo ne tro rapide iĝas efikaj en ĉiutaga vivo. Se en la realaj vivkondiĉoj ekzistas malriĉeco kaj timo kontraŭ senlaboreco, kion oni povus „aĉeti” ĉe Newsham? Sendube bone sinprezentantan lingvan varon: lingvon simplan, pli facilan ol la angla, forte ligitan kun pacaj intencoj, esprimantan esperon de Zamenhof pri ĝia universaligo, plifortigita socie pro persekutoj de ĝiaj uzantoj, kaj eĉ aplikatan dum armeaj ekzercoj. Tiu bona varo ne permesos tuj plimalgrandigi malriĉecon, senlaborecon, sed povas almenaŭ plifaciligi internaciajn kontaktojn — pensas

«grizaj homoj» kaj aĉetas la lingvon — komencas lerni Esperanton. La sama varo pritaksata estas alia el la perspektivo de ŝtatoj, tie la interludo de ekonomiaj-politikaj interesoj decidas kaj pri sinteno al la lingvo kaj pri ĝia «prezo» (atingebleco).

Ŝajnus, ke la ligo de Esperanto kun paco entute malhelpas ĝian funkcion en milit-armeaj kondiĉoj. Tamen en la 1962a jaro — kiel skribas Newsham — en usona armeo estis preparita por armeaj ekzercoj batalregulato titolita *Esperanto — lingvo de agresulo*. En milit-ludoj kun fikcia ŝtato-malamiko partoprenis soldatoj, kiuj uzis «la lingvon de paco». Oni elektis Esperanton, pro ĝia ideologia neŭtraleco kaj... facileco en lernado kompare kun iu ajn nacia lingvo. La aŭtoroj de la regulato estis ankaŭ konvinkitaj, ke «Esperanto estas nek artefarita, nek mortinta lingvo». Por esperantisto scianta pri tiu ĉi usona armea prov-uzo de internacia lingvo estos pli malfacile ripetadi senhezite, ke Esperanto estas (nur) lingvo de paco.

Ankaŭ la socia opinio, ke Esperanto estas lingvo sen kulturo ne favoras al ĝia evoluo. Al kontraŭargumentoj menciitaj en la artikolo apartenas la substreko, ke kulturo kiel literaturo (origina kaj tradukita) ekzistas en Esperanto. Kaj aliflanke la argumento, kiu emfazas la mankon de neŭtraleco kaze de naciaj (ekz. angla) lingvoj uzataj kiel internaciaj.

Karakterizo de Esperanto kiel varo devas enhavi ankaŭ gravan merkatan informon pri nombro de esperantistoj. La artikolo mencias du milionojn da uzantoj de la lingvo en 115 landoj en la mondo kaj du mil denaske parolantojn. Tio signifas multe pli grandan kvanton kompare kun la kvanto de UEA membroj, ekz.: «En 1996 — skribas Z. Sikosek — la asocio havis 7.277 individuajn membrojn el 117 landoj, kune kun la aligitaj membroj la tuta membraro de UEA estis 20.591».¹ Krome «en la tuta mondo estas diversaj enklavoj de Esperanto. En Brazilo homoj instruas tiun ĉi lingvon por legi librojn pri spiritoj. Ĉinoj kaj Japanoj ŝatas Esperanton, ĉar la angla estas tro malfacila por ili» — raportas Newsham.

Kiel aspektus mapo de Esperanto en la nuntempa Pollando? Ĉu estas sur ĝi forta Esperanta enklavo, ĉu nur kelkaj lozaj, reciproke izolitaj aroj de individuaj esperantistoj? Sur mia privata mapo troviĝas enklavoj de aktivaj esperantistoj kiel Malbork kun la pliriĉiganta Monda Parko, la ĉiam reFREŝiĝanta Olsztyn, Varsovio kun la misia E-teatro

kaj la energia Varsovia Vento, la turisma klerigejo de Bydgoszcz, spuroj de festivaloj en Toruń, la centriĝema Gliwice, la artista kaj eduka agado en Krakovo kaj la kulturaj kaj universitataj aranĝoj de Poznań nur menciitaj kelkajn. Povus sekvi ankoraŭ longa listo de individuaj agantoj. Sed la vojoj inter tiuj lokoj sur la mapo estas kelkfoje en malbona stato, kaj kelkloke vidiĝas ruĝaj signoj de ardaĵ konfliktoj. Do, kiel tio okazas en la vivo mem.

La pola aperigo de la artikolo de Newsham montras, ke la redakcio de *Forum* tro rapidiĝis kun ŝanĝo de la titolo. Entombigo: la *katastrofo de la artefarita lingvo* ne okazis. Kaj batalo inter vendistoj de la espero daŭras.

Vendistoj/popularigantoj de la Esperanta ideo estas ne nur ĵurnalistoj, instruistoj, verkistoj, aktivuloj, funkciuloj, sed ankaŭ «grizaj» esperantistoj.

Zbigniew Galor

«Kaj la sekva demando — kvankam iomete malfacile formi ĝin bone. Tiuj ĉi du milionoj da uzantoj de Esperanto... Ĉu ili ĉiuj estas ho- ➤

¹ Z. M. Sikosek, *Esperanto sen mitoj*, Antverpeno 1999, p.55; ankaŭ aŭtora piednoto sur tiu ĉi paĝo: Vd. *Esperanto*, 1997, aprilo, p.66. Jaron antaŭe aperis la membraro por 1995, je kiu mi kalkulis por kelkaj landoj la „Esperanto-densecon”: por (teoria) miliono da islandanoj ekzistas po 284 UEA-membroj (individuaj plus aligitaj). Luksemburgio: 259; Finnlando: 129; Svedio: 117; Hungario: 58; Nederlando: 49; Germanio: 21; (...) Usono: 4; Irano, Rusio kaj Peruo po 1,3; (...) POR UNU MILIONO DA HOMOJ EN LA MONDO EKZISTAS PO 3,8 UEA-MEMBROJ”. (elstarigo Z. G.)

Praktika uzado de la prepozicio POR

Estas sciante, ke en la lingvo internacia Esperanto troviĝas pli ol tridek diversaj prepozicioj, sed ili neniam estas uzataj memstare. Ĉiu prepozicio servas por submeti substantivon, pronomon aŭ esceptokaze infinitivan verbon sub alian substantivon, sub verbon, adjektivon aŭ adverbon:

lernu **por** scii, ŝipo **el** fero. **Laŭ gramatika vidpunkto Esperantaj prepozicioj funkcias dumaniere:**

1. Ili enkondukas substantivon, formante kun ĝi prepozitivon (przypadek przyimkowy).

2. Ili alprenas la e-finaĵon, formante kun ĝi prepozician adverbon. ➞



☞ moĵ de la sama tipo? Ĉu ili ĉiuj apartenas, hm, al meza klaso? — *Entute ne* — diras Simmons. — *Se vi vizitos Orientan Eŭropon, vi ekvidos, ke Esperanton lernas ordinaraj homoj.* Li aldonas, ke en ekskomunismaj landoj la lingvo de Zamenhof permesas forgesi de tempo al tempo la realecon. Krome, en la tuta mondo ekzistas diversaj enklavoj de tiu ĉi lingvo. En Brazilo tre forta estas kredo en spiritoj. Certa homo, kiu en la 40aj jaroj de la pasinta jarcento estis fama medio, skribis multe da libroj en Esperanto, kaj multe da miloj da Brazilanoj ĝis hodiaŭ lernas tiun ĉi lingvon cele legi tiujn ĉi librojn pri spiritoj. (...)

Kaj se temas pri Ipswich kaj aliaj

lokoj en la regiono kie agas *Eastern Esperanto Foundation* — kial homoj tie lernas tiun ĉi lingvon? — *Kelkajn allogas ideoj ligitaj kun la lingvo kiel paco en la mondo, kaj la aliajn beleco de tiu ĉi lingvo* — konstatas Tellier. — *Ankoraŭ aliaj volas vojaĝi.* Ebleco de libera parolado, baze de egalaj rajtoj, kun loĝantoj de aliaj landoj estas — plej evidente — tre atrakcia. — *Ni povas interparoli kun ordinaraj homoj surstrate* — ŝi klarigas. *Ni povas kontaktiĝi kun homoj pere de interreto. Ni povas skribi al ili. Esperanto estas lingvo de la ordinara homo».*

(D. Newsham, Łacina szarego człowieka, „Forum”, n-ro 31, 2003, p. 51., — tradukis Z. G.)

La prepozicio „por”, estas sufiĉe ofte uzata de ni. Ĝi esprimas ĝenerale la celon kaj pli precize montras:

• **tion, kies efektivigo aŭ akiro estas celata:**

Mi volonte vojaĝas **por** plezuro. Multaj laboras nun **por** malgranda salajro.

Agrable estas labori **por** komuna celo. **Por** kio vi intencas veni al mi?

Jam komenciĝis preparoj **por** la 26a ĈEP en Mielno.

Mi neniam etendas la manojn **por** almozo. Vi riskas vivon **por** duba rezulto.

• **tion, al kio estas destinita aŭ adaptita io aŭ iu:**

La ĉambroj de la dua etaĝo estas **por** gastoj. Ŝi ricevis vestojn **por** infanoj.

Ĉi tie laboras kuracisto **por** virinoj. Kie troviĝas glasoj **por** vino? Mi havas korktirilon **por** malŝtopi la botelon.

Rimarko 1. Se la subjektoj de la agoj estas identaj, oni plej ofte uzas infinitivon anstataŭ substantivon post **por**:

Kie estas akvo **por** trinki?

Mi prenis plumon **por** skribi. Jam estas tempo **por** enlitiĝi.

Urszula venis Mielnon **por** kanti. Multaj havas nenion **por** manĝi.

Mi havas multon **por** fari. Jam estas tempo **por** fini la kunsidon.

Rimarko 2. Post la predikatoj esprimantaj movon oni ne uzas **por**:

Iru serĉi la infanojn. Ŝi tuj kuris

bati lin. Baldaŭ ili venos nin viziti.

• **la objekton de interŝanĝo:**

Mi pagis 20 zlotojn **por** mia ĉemizo. Tiu drapo kostas po 10 zlotoj **por** metro.

Por ĉiu tago mi ricevas 50 zlotojn. **Por** nenio oni faras nenion (Z).

Pagas maljunaj jaroj **por** junaj eraroj (Z). Agrable estas ŝanĝi ion **por** io. Mia nepo ŝanĝis trotilon **por** biciklo.

Rimarko 3. Post la verbo **danki** estas nuntempe pli ofte uzata la prepozicio **pro**.

Mi dankas vin **pro** via amika helpo. (sed oni povas ankaŭ skribi: korean dankon **por** via letero).

• **la aĉet- aŭ vendoprezon:**

Mi aĉetis bieron **por** du zlotoj. Oni povas aĉeti novan biciklon **por** 300 zlotoj.

Por tiu prezo la biciklo ne estas kara (multekosta). Tiun ĉi fotoalbumon mi aĉetis **por** kelke da zlotoj. Li vendis sian malnovan aŭton **por** 3 mil zlotoj.

Mi pagis 100 zlotojn **por** miaj novaj ŝuoj.

• **la predikaton = kiel, kvazaŭ: (laŭ PIV)**

Mi prenis vin **por** iu pli merita. Mi prenis la danĝeron **por** ŝerco. Oni povus preni ĉi tiun ĉambron **por** laborejo. Ŝtono servis al ni **por** seĝo. Ili havis tendon **por** loĝejo (loĝado). Akceptu la bukedon da rozoj **por** rekompenco de via gastameco.

• **la personon, je kies profito aŭ kontentigo oni agas:**

Ni kolektis monon **por** mizeruloj. Patrino aĉetis glaciaĵojn **por** siaj infanoj.

Tiu ĉi kafo estas **por** vi. La filino ŝatas kanti **por** si mem. En unuiĝanta Eŭropo kreskas fervoro **por** neutrala lingvo internacia. Ĉiuj **por** si, **por** ĉiuj Di' (Z).

Kiu **por** ĉiuj laboras, pri si mem ne memoras (Z).

• **la personon, kiun koncernas la ago:**

Tio estas **por** mi indiferenta.

Belaj tagoj en Mielno restos **por** ni ĉiam memorindaj. Tiu ĉi afero estas nekomprenbla **por** mi. La lasta Kongreso en Svedio estis vera triumfo **por** Esperanto. Lia morto estas granda perdo **por** esperantistoj.

• **la estontan tempodaŭron, dum kiu devas daŭri la ago:**

Mi intencas forveturi **por** unu monato. Pruntedonu al mi vian libron **por** unu semajno. Ŝi sidiĝis ĉe la marbordo **por** iomete da tempo.

Rimarko 4. Oni ofte trovas **por** antaŭ adverbo: Li foriris de ni **por** ĉiam (**por** eterne).

Kelkfoje oni uzas **por** esprimante agodaŭron: Mi amos vin **por** eterne.

La celon de nia ago montras ankaŭ la celaj subpropozicioj enkondukataj per **por ke**, kiu laŭ PAG estas mallongigo de **por tio ke**:

Mi donacis al ŝi la lernolibron, **por ke** ŝi bone preparu sin al ekzameno.

Li pruntedonis al mi iom da mono, **por ke** mi povu forveturi ekster-

landen.

Ili faris ĉion eblan, **por ke** mi sentu min hejme en ilia domo.

La besto estas tro sovaĝa, **por ke** oni povu ĝin dresi.

Por tio ke povas esti uzata, se oni volas insisti pri la celeco:

Mi venis **por tio, ke** ni fine aranĝu la aferon. Ne **por tio** li laboris, **ke** nenian pagon oni donu al li.

Kelkfoje oni eĉ forlasas **por**: trapiku lin, ke li momente falu (Z).

Se la subjekto de la ĉefpropozicio kaj subpropozicio estas **identaj**, oni plej ofte uzas infinitivan konstruon kun **por**:

Mi venis **por** diri al vi kelkajn vortojn pri nia komuna amiko. Mi diris tion ne **por** vin timigi, sed **por** averti pri la danĝero. Tio estas tro bela **por** esti vera. Viaj okuloj estas tro puraj **por** vidi malbonon.

Se la subjektoj de du propozicioj ne estas identaj, tia konstruo ĝenerale estas nekorekta, ĉar oni uzas simplan infinitivon sen **por**: La dommastrino donis al gastoj manĝi kaj trinki. Li sendis ŝin promeni. Mi sendos venigi kuraciston. **Estas tamen esceptoj**:

Por paroli sincere, via argumento estas absurda. Li estas, **por** tiel diri, sia propra malamiko. Restas nenio **por** fari.

Ĝenerale parolante mi klopodis prezenti al vi praktikan uzadon de la propozicio **por** en la plej simpla formo, sed mi ne sukcesis eviti gramatikan terminaron por klarigi ĉion. ➞

Torunaj esperantistoj semas kaj semas...

„Bona espero” por studentoj

En la iama vigla centro de la studenta esperantista vivo — en Nikolao Kopernik Universitato en Toruń denove oni parolas pri Esperanto. Por denove interesigi studentaron pri la internacia lingvo, komence de la studjaro 2002–2003 la junaj torunaj esperantistoj — iamaj studentoj



☞ Evidentiĝas, ke en Proverbaro Esperanta, prilaborita de Ludoviko Zamenhof, troviĝas ankaŭ multaj proverboj kun la sama prepozicio.

Jen kelkaj speciale por vi:

Por ĉiu plezuro devas esti mezuro. **Por** amiko intima ne ekzistas vojo malproksima. **Por** gasto ne petita mankas kulero. **Por** fremda koro ne ekzistas esploro. **Por** amiko komplezo neniam estas tro peza. **Por** peko senkonscia puno nenia. De kiu la kulpo, **por** tiu la puno. Fianĉiĝis–**por** ĉiam ligiĝis. Ĝi estas **por** mi makulo en la okulo. Pluvo en aprilo–**por** la tero utilo. Ne taŭgas la vero **por** komerca afero. **Por** paro amanta ĉiu loketo sufiĉas. **Por** sperto kaj lerno ne sufiĉas eterno.

de la toruna universitato — Marzena Staniszevska kaj Wojciech Misiara iniciatis ciklon de diskutrenkontiĝoj en la populara studenta klubejo „OD NOWA”.

La renkontiĝoj, gvidataj pollingve, celas rimarkigi la lingvan problemon en la nuntempa mondo kaj prezenti valoron kaj eblecojn utiligi Esperanton en diversaj medioj.

Ĝis nun okazis 5 renkontiĝoj el tiu ĉi ciklo. Kiel la unua preleganto venis la konata el la pola televido redaktoro Roman Dobrzyński, kiu parolis pri lingvaj problemoj en diversaj landoj kaj prezentis sian filmon „Ludovikoj en Brazilo”. La filmo vekis interesigon inter publiko, precipe pro la rakonto pri „Bona espero” — la fama edukcentro en Brazilio, fondita kaj gvidata de esperantistoj. Ek de tiu ĉi renkontiĝo la tuta diskutciklo uzas la nomon „Bona espero”.

Sekve gastis ĉe la torunaj studentoj sciencistoj–esperantistoj el Poznań: doc. dr Ilona Koutny kaj dr Zbigniew Galor, kiuj rakontis pri uzo de Esperanto en sia scienca laboro kaj ankaŭ dum la ĉiutaga, privata vivo. Tre interese prezentis la lingvajn problemojn en sia lando kaj interesigon pri Esperanto en Afriko Moliere Ngangu, sperta esperantisto el Kongo kaj liaj du samlandanoj–komencantoj. Siajn spertojn pri Esperanto preparo-

lis ankaŭ la lasta prezidanto de la iama toruna Studenta Scienca Rondo de Esperantistoj — Jarosław Parzyższek, konata ankaŭ kiel longjara aktivo en la landa kaj internacia Esperanto-movado.

Surprize multajn interesiĝintojn kunvenigis la lasta ĉijara renkontiĝo, dum kiu la etnologo Kinga Nemeře-Czachowska rakontis pri sia renkontiĝo kun la fama esperantisto-montvojaĝanto Tibor Sekelj kaj pri siaj propraj vojaĝoj en Sud-Aameriko, dum kiuj ŝi renkontis esperantistojn kaj uzis la internacian lingvon.

La renkontiĝoj „Bona espero” enradikiĝis en la programo de la studenta klubo „OD NOWA”, sciigas pri ili la urba informilo, ankaŭ la studenta „RADIO-SFERA”, kiu uzas la okazaĵojn kaj intervjuas la prelegantojn.

„La mondo plena de amikoj”

Novajn formojn de esperantista agado oni povas trovi en Toruń ankaŭ ekster la Universitato. Antaŭ unu jaro junaj torunaj esperantistoj eksperimente proponis paroli pri Esperanto en la publika kafejo „POD ANIOŁEM”, situata en la kelo de la toruna urbodomo kaj vizitata precepte de junularo. Malgraŭ multaj duboj pri la rezulto, la okazinta tie prelego de Teresa Nemeře pri Japanio, kiun la prelegantino ekkonis okaze de la 88a Japana Esperanto Kongreso, ilustrita per lumbildoj kaj japana muziko, kunvenigis surprize mul-

tajn aŭskultantojn, vekis videblan interesiĝon.

Tiu sukceso kaj la fakto, ke lastatempe ĉiam pli kaj pli multaj esperantistoj el diversaj landoj vizitas Toruń, kiu estas interesa, historia urbo, kaj la naskiĝurbo de la fama astronomo Nikolao Koperniko, torunaj esperantistoj organizis ciklon de publikaj renkontiĝoj kun esperantistaj gastoj, titolita „La mondo plena de amikoj”.

La renkontiĝoj, tradukataj al la pola lingvo, okazas en la urbaj kafejoj, tejoj aŭ aliaj publikaj renkontiĝejoj. La organizantoj celas prezenti interesajn kulturelementojn de aliaj landoj kaj valoron de la neŭtrala lingvo Esperanto en la internaciaj kontaktoj.

La renkontiĝoj el tiu ĉi ciklo komenciĝis aŭtune. En la kafejo antaŭnelonge organizita en unu el la plej ofte vizitataj lokoj en Toruń — en la fama toruna Oblikva Turo — gastis la fama esperantisto-Nobelpremiito, prof. Reinhard Selten el Bonn kaj prof. Robin Pope



Wieczór z esperantystami z Konga.
Herbaciarnia Figiel, ul. Duchy Świętego 2
Niedziela 23.02.2003 g. 17
Impreza otwarta z tłumaczeniem

el Aŭstralio, akompanataj de polaj esperantistoj el norda Pollando, kaj poste diverslandaj studentoj–esperantistoj de la Interlinvistikaj Studoj en la Universitato en Poznań.

Vintre sekvis vespero kun esperantistoj el Afriko kaj la prelego de Moliere Ngangu pri la tradicia muzikado kaj la nuntempa muziko en Kongo, okazinta en la novmalfermita tetrinkejo „Figiel”.

La lasta renkontiĝo el tiu ĉi ciklo malfermis vojon (ni kredu, ke efektive) al la nova medio. Ĝi estis eksperimente organizita en la Centro de Socia Dialogo ĉe la toruna episkopejo. Tie okazis prelego de la hispana esperantisto Augusto Casquero de la Cruz, kiu rakontis pri la 1000-jara tradicio de pilgrimado al Santiago de Compostela. Post la vespero la direktoro de la Centro deklaris pretecon al plua kunlaboro kun esperantistoj.

Ĉiuj ĝisnunaj renkontiĝoj kunvenigis multajn interesiĝintojn, ĉiuj estis anoncataj aŭ en la urba kulturinformilo aŭ en la lokaj gazetoj, ankaŭ helpe de porokazaj afiŝoj.

Tiamaniere torunaj esperantistoj semas en la urbo informojn pri Esperanto kaj ĝia valoro.

Ĉu la okazintaĵoj fruktos ankaŭ per la praktika intersiĝo pri Esperanto? Ni esperas, kaj ni vidos post kelka tempo.

Kun Esperanto en la mondon

Junaj torunaj esperantistoj Marzena Staniszewska kaj Wojtek Misiara, entusiasmaj gastigantoj de esperantistoj kaj iniciatintoj de novaj, interesaj formoj de informado pri Esperanto, komence de julio foriros de Toruń. Mi kaptis la okazon interparoli kun ili pri tio:

Kial vi forlasas nian belan urbon kaj Esperanto–agadon, kiun vi tiel efike komencis?

M.: Ni ne forlasas Toruń, ni nur foriras de tie por 2 jaroj kaj ni ne forlasas Esperanton.

W.: Kontraŭe, ni kredas, ke ni revenos „pli verdaj”, pli riĉaj je multaj esperantistaj spertoj.

Tio sonas interese kaj iom mistere. Ĉu vi povas malkaŝi, kien vi foriras kaj por kio?

M.: Ni planas vojaĝon ĉirkaŭ la mondo.

W.: Por kio? Ni volas nombri esperantistojn. Ja oni diras, ke neniu ĝis nun scipovis tion fari... Dirante pli serioze ni devas malkaŝi, ke ni havas ankaŭ nian propran celon. Ni rimarkis, ke ĝis nun, dum studjaroj kaj poste, dum la kelkjara intensiva laboro, ni ne havis tempon orientiĝi, serioze pripensi, kio estas por ni la plej grava, kiun vojon ni elektu en nia vivo. Nun, kiam ni estas memstaraj kaj ni ankoraŭ ne radikigiĝis en la ĉiutagan „plenkreskan” vivon, ni volas rigardi la mondon, viziti diversajn landojn, ekkoni diversajn kulturojn kaj ideojn. Ni volas senpere tuŝi vivon de diversaj homoj, por poste konscie decidi

pri nia propra vivovojo kaj vivoloko.

Ĉu estas vero, ke jam planinte la vojaĝon vi decidis eklerni Esperanton? Kial?

W.: Jes, kiam ni jam havis skizitan planon, niaj geamikoj Agnieszka kaj Krzysztof revenis post sia longa vojaĝo tra Eŭropo kaj Sud-Ameriko kaj ili rakontis, kiel interese oni povas vojaĝi konante Esperanton. Ili rakontis, ke Esperanto malfermadis al ili privatajn pordojn en diversaj landoj, ke dank' al Esperanto ili renkontis ne nur helpantojn, sed trovis ankaŭ multajn geamikojn, povis ekoni ilian ĉiutagan vivon.

M.: Agnieszka konvinkadis mallonge: „se vi volas vojaĝi ne nur inter muroj, sed inter homoj, eklernu Esperanton!”

W.: Do, ĉar ĝuste tiaspeca vojaĝo interesas nin, ni decidis ekkoni la lingvon.

De tiu tempo pasis eĉ ne du jaroj kaj vi jam flue uzas la internacian lingvon, kiamaniere vi lernis ĝin?

M.: La vojo estis vere interesa. Ni trovis en la urba antikvaĵejo la malnovan lernolibron de A. Pettyn kaj dum la tuta vintro, preskau ĉiuvespere, mi laŭte legis ĝin, eĉ, kiam Wojtek kelkfoje traktis tion kiel bonan dormigilon. Poste ni multfoje aŭskultis, plej ofte en aŭtomobilo, la malnovajn kasedojn kun Esperanto-dialogoj.

W.: La ŝanĝo okazis pasintprintempe, kiam Agnieszka kaj Krzysztof, konante niajn planojn kaj strebojn, invitis nin al via prelego pri Japanio,



okazinta en la populara en Toruń junulara kafejo. Kiel vi bone scias, la renkontiĝo fruktis per ĉiusemajnaj Esperanto-kunvenoj en via hejmo, per „verdaj jaŭdaj vespero”.

Kion donis al vi tiuj renkontiĝoj?

W.: Ho, vi estas severa kaj multflanka instruistino. Vi zorgis ne nur pri nia korekta uzo de akuzativo, sed dank' al vi ni vere ekkomprenis, ke Esperanto estas normale funkcianta lingvo.

M.: Mi memoras, kiel impresis nin, dum unu el la komencaj renkontiĝoj, 5 esperantlingvaj telefonoj al vi el diversaj landoj.

W.: Kaj rapide, por paroligi nin, vi venigis al Toruń la tutan buson de danaj esperantistoj, devigante nin prezenti la urbon por la gastoj. Kune kun vi ni partoprenis niajn unuajn Esperanto-aranĝojn en Malbork kaj en Poznań. Praktike, dank' al vi ni eniris la esperantistan mondon.

Ĉu vi jam ankaŭ kontaktiĝis kun esperantistoj eksterlande?

W.: Jes, por provi utilecon de Es-

peranto en nekonata lando, pasint-somere ni decidis vojaĝi al Ukrainio, al Odeso kaj ni konvinkiĝis, ke Agnieszka kaj Krzysztof pravas. Uzante Esperanton kaj la „Pasportan servon” ni trovis tie esperantistojn — vere amikajn, simpatiajn homojn, kiuj zorgeme nin gastigis kaj montris la urbajn interesaĵojn. Nur dum vojaĝo kaj komencaj paŝoj en Odeso ni devis uzi la rusan lingvon.

M.: Ni scias, ke ne ĉiupaŝe ni povos uzi Esperanton kaj ke multajn organizajn aferojn ni devos oranĝi pere de aliaj lingvoj, ni scias ankaŭ, ke en diversaj lingvoj ekzistas abunda literaturo pri la vizitotaj landoj, sed ni volas ne nur supraĵe observi la mondon laŭ la gvidlibraj informoj, sed ni volas ekkoni la vivon de la renkontotaj homoj, simbole dirante — „enrigardi iliajn manĝopotojn” kaj ni jam scias, ke Esperanto tion helpas.

Bele kaj interese. Adiaŭante vin, mi tutkore bondeziras bonan, sukcesan vojaĝon.

Ne forgesu, ke ni atendas viajn raportojn pri ĝi.

W.: Adiaŭante vin ni volas esprimi nian dankon. Certe mankos nun al ni niaj „verdaj vesperoj”, kaj viaj diversaj konsiloj. Feliĉe, nuntempe ni povos kontaktiĝi retroŝte kaj ni esperas, ke dum la vojaĝo vi povos viziti nin sur nia retpaĝo: www.naszawyprawa.com.

Ni kore invitas vin, ankaŭ aliajn esperantistojn, kiujn interesos niaj travivaĵoj.

JUBILEA ĈEP-ARANĜO en MIELNO

Jubilea ĈEP-aranĝo rezultigis varman senton,

tre kontentis verdstelanoj solenante la eventon.

En la gaja, frata rondo flirtis koro al la koro,

ĉiujn ligis amikeco, multaj kantis kun fervoro.

Sonis vortoj de la kanto en la lingvo ESPERANTO.


Tiel en poezia formo oni povus esprimi la etoson de la 25a Ĉebalta Esperantista Printempo, okazinta en Mielno en la tagoj 17–25 de junio 2003 jaro. La aranĝon, honore protektatan de Mirosław Mikiełyński (prezidento de Koszalin) kaj Zbigniew Choiński (komunumestro de Mielno), partoprenis preskaŭ 80 esperantistoj el 11 landoj: Belgio, Bjelorusio, Britio, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Usono kaj Pollando. Pri internacia karaktero de jubilea ĈEP atestis naciaj flagoj, gaje flirtantaj en la vento supre de la granda, blanka panelo kun verdkolora surskribo: „Ĉebalta Esperantista Printempo”.

Multaj gesamideanoj venis Mielnon jam la 16an de junio por ĝui la maron kaj freŝan aeron saturitan de jodo. Tuj post la alveno ĉiu aliĝinto ricevis de organizantoj flavan saketon kun diversaj esperantaĵoj, inter kiuj troviĝis la plej nova

turisma informilo pri Koszalin, noveldonitaj poŝtkartoj, legmarkiloj kaj enhavoriĉa bulteno „Espero” ĈEP-Programo kaj kun multaj informoj pri la regiono. Ĉiujn poŝtkartojn oni povis stampi surloke per porokaza stampilo.

La 17an de junio post la matenmanĝo multaj pasigis la tempon alfreske, admirante belecon de la marpejzaĝo. Posttagmeze okazis aŭkcio de esperantaĵoj kaj precize je la 17.00 horo komenciĝis la solena inaŭguro de la 25a Ĉebalta Esperantista Printempo, kiun partoprenis ankaŭ koŝalinaj esperantistoj kaj invititaj gastoj. En belege dekoraciita kunvenejo ĉiuj sidlokoj estis okupitaj. Inter invititaj gastoj troviĝis honoraj protektantoj de la aranĝo, direktoro de Sporta Hotelo, ĉefredaktorino de E-Redakcio de Pola Radio kaj reprezentantoj de amaskomunikiloj. Ĉiujn kunvenintojn varmege bonvenigis Czesław Baranowski, ĉeforganizanto de la aranĝoj ekde 1991 jaro kaj samtempe prezidanto de PEA-Filio en Koszalin. En kortuŝa inaŭgura parolado li esprimis sian grandan ĝojon pro la kreskanta populareco de Ĉebaltaj Esperantistaj Printempoj. Al ĉiuj kunvenintoj estis fluantaj liaj afablaj vortoj kaj bondeziroj. Fine de sia parolado li konatigis ĉiujn kunbondeziroj venintaj de: Renato Corsetti — prezidanto de UEA, Stanisław Mandrak — prezidanto de PEA kaj Andrzej Pettyn. Laŭvice se-

kvis salutvortoj de honoraj gastoj kaj distra parto de la solenaĵo, dum kiu plaĉajn kantojn pre-



EN MIELNO

zentis la koruso „ESPERO”. Okaze de la kvina sinsekva kantoprezentado dum ĈEP-aranĝoj korusanoj ricevis de organizanto belegan diplomon kun surskriboj en la pola kaj Esperanta lingvoj. Indas aldoni, ke ambaŭ partoj de la solenaĵo estis filmataj de Szczecina Televido kaj la saman tagon vespere ĉiuj rigardis sufiĉe vastan raporton pri ĈEP en la tria televidprogramo. Korvarmiga estis ankaŭ interkonatiĝa vespero kun dancado ĉe akompano de bona orkestriono. Tre ofte aŭdiĝis popularaj polaj kantoj en la lingvo internacia. Dancemuloj agrable kaj gaje pasigis la tempon ĝis noktomezo kaj dum ritma movado de la korpoj dancanta estis ankaŭ feliĉo en la koroj.

La sekvontan tagon antaŭtagmeze okazis interesa prelego pri jogo kaj sano, preparita de Evelyne Chibleur el Francio. Poste sekvis libera tempo, dum kiu multaj faris agrablan promenon tra Jamno-lago sur la ferdeko de „MILA”-motorboato. Posttagmeze komenciĝis gaja kantado kun akordiona akompano kaj Jogo-ekzercado. Oni devas substreki, ke tre aktiva estis ĉi-jare la grupo da kantemuloj, gvidata de bonega instruistino Urszula Giercarz, kaj

multnombra fariĝis grupo da jingo-ekzercantoj, sub sperta gvidado de franca esperantistino Evelyne. Vesperajn programerojn inaŭguris D-ro Werner Bormann per interesa prelego „Aktualaj problemoj de tutmondiĝo”. Iom pli poste ĉiuj spektis amatoran videofilmon pri la 87a Universala Kongreso de Esperanto, majstre muntitan de Gunter Ebert (DE). Pri la kongresa etoso estis prezentita ankaŭ dua videofilmo interese preparita de Walter Cebulski el USONO.

Preskaŭ ĉiutage okazis prelegoj vekantaj la atenton de la aŭskultantoj, sed la plej grandan intereson vekis la prelego „Eŭropo integriĝas, dum rezistoj bremzas” oratorita de Werner Bormann. Pri aktualaj temoj prelegis ankaŭ Werner Pfennig, estro de Meklenburgia E-Asocio. Post lia prelego „Medioj kaj mono — la potenco de monopoloj” aperis multaj interesaj demandoj.

Tre plaĉis al ĉiuj muzikprelego pri komponistoj de germana romantiko el la XIX jc., preparita de Gunter Ebert (DE), videofilmoj pri Belgio kaj pri fama pilgrimloko Lourde, kun enkondukaj vortoj de Maurice Paridaens (BE), kaj videofilmo pri historio de Koszalin kun klarigoj en Esperanta lingvo fare de Czesław Baranowski.

En la riĉa E-programo troviĝis ankaŭ aliaj programeroj merittantaj specialan atenton, ekzemple: poezia vespero (dum kiu elek-

titajn poeziaĵojn prezentis Zofia Kamieniecka, Bogusław Sobol kaj Czesław Baranowski), vespero de eŭrohumoro (dum kiu multaj ŝercemuloj klopodis bonege amuzi ĉiujn), konkurso pri dancado kun dolĉaj premioj (la unuan premion gajnis paro Renata Wolska kun Wilfrid Jacques (GB), konkurso pri Mielno kaj Koszalin (en la konkurso distingiĝis Gunter Ebert kaj Helena Burchardt, sed premiitaj per albumoj kaj videofilmoj pri Koszalin estis 5 personoj), konkurso pri vortfarado sponsorata de Kazimierz Strzelecki (kvar plej bonaj konkursanoj ricevis Ampleksan Polan-Esperantan Vortaron).

Neforgeseblajn impresojn lasis post si du busaj ekskursoj al Słupsk, Ustka, Darłowo kaj al Koszalin, Strzeżęcín. Danke al ĉiĉerona helpo de esperantistoj el Słupsk (Janusz Zych kaj Henryk Wower) la ekskursantoj vizitis tiean neogotikan urbodomon kun belegaj vitraloj kaj konatiĝis kun pluraj historiaj konstruaĵoj en la urbocentro. Esperantistoj haltis ankaŭ ĉe tiea Zamenhof-monumento por meti bukedon da belaj floroj. Poste sekvis vizitado de Ustka kaj Darłowo. Kadre de la dua ekskurso ĉiuj konatiĝis kun la plej valoraj antikvaĵoj de Koszalin, metis florojn ĉe la memorŝtono omaĝe al L. L. Zamenhof, kafumis en la belega sukkena palaco en Strzeżęcín, vizitis Chełmska-monton kun bela kapelo de S-ta Maria kaj kun

altiĝanta panoramuro, de sur kiu multaj admiris belegan ĉirkaŭaĵon de la urbo.

Dum la tuta aranĝo diligente laboris du germanaj esperantistoj—radioamatoroj, forsendante informojn pri ĈEP en la mondon kaj ricevante de multaj eksterlandanoj salutvortojn. Jubilea ĈEP—aranĝo donis okazon al organizantoj inviti denove al Mielno estraranojn de la Ĉefa Estraro de PEA. La 21an de junio je la 9.00 okazis interesa renkonto kun ĈEP—partoprenantoj, kiun bonege profitigis Stanisław Mandrak por prezenti aktualan situacion de E—movado en Pollando kaj instigi ĉiujn al abonado de „Pola Esperantisto”. Dum la renkonto voĉon prenis ankaŭ Jan Książek kaj aliaj estraranoj de PEA por rilati al konkretaj demandoj.

Multajn impresojn donis al ĉiuj adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado, gaja kantado kaj dancado ĝis malfrua nokto. Kvankam ĉi—jara vetero ne favoris al sunbruniĝado, en la gastama Sporta Hotelo rapide fluis la tempo kaj neniu enuis. La lastan tagon, dum tradicia sumigo de la aranĝo, ĉiuj esprimis sian kontenton pro la bonega preparo de jubilea ĈEP, pro la riĉa E—programo kaj pro neripeblebla esperantista etoso. La afablaj dankvortoj de esperantistoj kaj la belega bukado da floroj kun verdkolora fotoalbumo por ĉiam restos en la memoro de ĈEP—organizinto.

Czesław Baranowski

La Dua Balta E—Forumo

Tre riĉan klerigan programon havis la dua Balta Esperanto—Forumo, kiu okazis 17—22 jul 2003 en Olsztyn (Pollando) kun 55 partoprenantoj el ses landoj.

La ĉefan temon de la Forumo, „Slavaj influoj en Esperanto”, laŭ la aspektoj lingva, movada, ideologia kaj kultura, prezentis Aleksander Korĵenkov.

Aliaj prelegoj estis dediĉitaj al: Esperanto—vortaroj en la reto (Witold Czerwiński), interkultura komunikado per Esperanto kaj la angla (Ilona Koutny), EEU (Johan Derks), Olsztyn (Elżbieta Leonowicz—Frenszkowska), Prusujo sen legendoj (Wolfgang Kirschstein), nevidantoj (Irena Łowińska), „Solidareco” en Kaliningrad (Alen Kris), nacia, eŭropa, internacia niveloj de identeco (Zbigniew Galor), Siberio (Aleksiej Birjulin).

Du jubileantaj libroj ricevis apartan pritrakton: la 100—jara „Fundamenta Krestomatio” (Halina Gorecka) kaj la 75—jara „La tajdo” de Nikolao Hohlov (Aleksander Korĵenkov). Nora Caragea rakontis pri siaj tradukoj. Sed la plej interesa literatura evento de la Forumo estis lanĉo de la „Rusa Novelaro”, eldonita de „Sezonoj” en julio — la tuta stoko, kunprenita de la eldonantoj, estis rapide disaĉetita je speciala unuataga prezo, kaj la tri ĉeestantaj tradukantoj havis agrablan takson subskribi ĵusaĉetitajn ekzemplerojn.

Al la diskutrondo „UEA: de pro-

Kun bedaŭro kaj profunda tristo ni informas, ke la 19an de aŭgusto 2003 jaro en Bydgoszcz (Pollando) en la aĝo de 46 jaroj mortis nia Amiko, unu el la plej fidelaj kaj aktivaj multjaraj anoj de „Monda Turismo” ASci. mag. TOMASZ JAN KUDREWICZ – Honora Ano de Monda Turismo, dum dudek jaroj direktoro de Centra Oficejo de Monda Turismo kaj Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Adjunkto Scienca de la Akademio Internacia de la Sciencoj, fakdelegito pri komputiloj de Universala Esperanto Asocio, magistro pri politikaj sciencoj, prezidinto de Pola Esperanto-Junularo, kaj eksestrarano de Pola Esperanto Asocio, redaktoro de multaj Esperanto-eldonaĵoj.

Li ĉiam restos en nia memoro.

Estraro, membroj, gestudentoj de Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo „Kujavio kaj Pomerelio” en Bydgoszcz kaj Internacia Klubo „Esperantotur”



➔ blemoj al krizo” skribe kontribuis Renato Corsetti, István Ertl, Giorgio Silfer kaj Jakvo Schram, kiuj diverse traktis la temon. Alia diskutrondo estis dediĉita al la Esperanta gazetaro ĝenerale kaj speciale al „La Ondo de Esperanto”, kies pluraj redakciaĵoj, kunlaborantoj kaj legantoj ĉeestis. Aktivuloj el norda Pollando, Litovio, kaj Kaliningrada regiono havis plian sesion de la tradicia seminario pri kunlaboro en ĉi tiu regiono.

Ekskursoj gvidis la forumanojn al la urbo mem, kiu ĉi-jare festas sian 650-jariĝon, kaj al interesa skanzeno en Olsztynek. La streĉan laborprogramon variigis interkona vespero ĉe fajro kun kolbasetoj kaj biero, po-

la vespero en regionstila restoracio „Karczma Warمیńska”, orgena koncerto en la katedralo kaj la adiaŭa vespero en restoracio „Kolorowa”.

Preskaŭ ĉiutage Marian Zdanowski amuzis kaj pensigis la ĉeestantojn en FREŜO — eble la plej fama kviza programo en Esperantujo.

La ĉefa riproĉo, kiun la kunorganizantoj (Varmia–Mazuria E-Societo kaj „La Ondo de Esperanto”) ricevis en la lasta kunveno estis trostreĉeco de la programo, kaj por bani sin en la belaj (apud)urbaj lagoj oni devis malĉeesti interesajn preleigojn kaj kunvenojn.

Halina Gorecka
„La Ondo de Esperanto”

Gotenburgo, 26.07–2.08.2003

La 88a Universala Kongreso de Esperanto estis organizita ĉi jare en Gotenburgo, Svedio.

Mi havis okazon denove partopreni la aranĝon. Mia unua kongreso estis tiu en Tampere en la jaro 1995, do mi tre volonte vizitis laŭvican skandinavian landon, ĉar Skandinavio ŝajnas al mi tre bela somere. Miaj esperoj plene realiĝis. Vetero estis bela kaj renkontiĝoj kun intere-



Parolas la unua ambasad-sekretariino en Stockholmo, s-ino Joanna Wijaszka. Tradukas Stanisław Mandrak.

(fotis: Stano Marcek)

saj personoj dum la kongreso plene min kontentigis.

Programo, kiel ĉiam, estis miksaĵo de diversaj aranĝoj, do ĉiu povis elekti aranĝojn plej interesajn por si. Tamen fundamento de la kongresa programo estis kiel kutime: Solena Inaŭguro, Nacia Vespero, Bandedo kaj Kongresa Balo, Internacia Vespero, Solena Fermo. Dum Solena Inaŭguro krom oficiuloj el Svedio kaj ambasadoro el Ĉinio salutis ankaŭ

pola diplomatinjo Joanna Wijaszka el pola ambasado en Svedio. La saluton tradukis Stanisław Mandrak. Mi havis honoron saluti kongresanojn nome de polaj esperantistoj. Unua foje Solena Inaŭguro okazis lunde ĉar svedoj tre serioze traktas leĝojn pri labora tempo. Svedoj ĝenerale sabato kaj dimanĉe ripozas, do oficiuloj ankaŭ. Ĉu tia kutimo estas bona? La legantoj respondu mem.

La Konreso multajn aranĝojn destinis al temo: „Lingvaj rajtoj kaj respondecioj”. La temo, precipe en Eŭropo, estas tre aktuala kaŭze de plivastigo de Eŭropa Unio. Do, mi opinias, ke la movado elektante la temon eniris al mondan politikon montrante sian aktivan neŭtralecon.

Min tre interesis temoj kunligitaj kun Esperanta movado, do mi decidis partopreni aranĝojn kies temoj iamaniere kongruis kun la movado.

Tre interesa estis diskuto dum kunsidoj de komitatoj de UEA pri proponoj de junuloj el TEJO. Observata malkreska nombro de individuaj membroj de UEA kaj sekve ankaŭ malkresko de enspezoj vekas atenton kaj timon pri krizo de la organizo. Junuloj postulis uzon de kapitalo, sed kiu garantius ke la kapitalo revenos al UEA. Do, responsuloj decidis ŝpari je elspezoj. Bedaŭrinde, la decido kvankam ekonomie saĝa, verŝajne detruos iniciatemon de junuloj. Priskribante la aferojn mi devas mencii, ke ĉiu estrarano de UEA partoprenas kongresojn kaj kunsidi-

dojn proprakoste. Tio ofte ne estas eĉ rimarkebla, sed glorinda.

Strategian forumon ĉi jare anstataŭis diskuto: „Kion Esperanto povus oferti al scienco kaj kion scienco povus oferti al Esperanto”. Ŝajnas, ke scienco nun forte kunlaboras kun Esperanto en branĉo nomata interlingvistiko, sed ankaŭ sciencistoj bezonas facilan komunikilon por ke iliaj eltrovaĵoj estu rapide uzeblaj en la mondo.

Fine, priskribante la kongreson mi devas mencii poilojn kiuj meritis je kongresaj aranĝoj. Impozanta teatraĵo „Aniaro” prezentis al la kongresanoj Jerzy Fornal. Li plene demonstris sian profesiecon. Bedaŭrinde la teatraĵo estis malfacila por spektantoj pro malofte uzataj specifaj vortoj.

Tre valoran recitalon preparis Jerzy Handzlik. Bedaŭrinde organizantoj ne rezervis al li pli vastan ejon.

Redaktorino Barbara Pietrzak gvidis lerte renkontiĝon de radioaŭskultantoj. Ni havis eksterordinaran okazon ne nur aŭdi la voĉojn konatajn el radioriceviloj kaj ankaŭ ilin „vidi”.

Kongreso finiĝis per Solena Fermo. Ĉijara kongreso jam estas historio, sed sekvonta okazos en Pekino. Do, venu tien!

Aleksander Zdechlik

GRUPE-7 en Gliwice

Jam tradicie la sepan fojon esperantistoj el Filio de PEA en Gliwice invitas al renkontiĝo de praktikantoj kaj uzantoj de Esperanto. Organizantoj antaŭvidas kiel ĉiam riĉan amuzan kaj „seriozan” programon. Jam anoncis sian partoprenon esperantistoj el kelkaj landoj.

GRUPE-7 okazos inter la 8-a (sabato) kaj 11-a (mardo) de novembro.

Oni povas mendi la tranoktadon en lerneja loĝejo kontraŭ 25 PLZ po unu nokto.

Se Vi ankaŭ volas partopreni la renkontiĝon bonvolu kontaktiĝi uzante la subajn eblecoj:

perletere: Esperanto, skr. poczt. 21, PL 44-101 Gliwice

fakse: (0-32) 238 20 43

telefone: (0-32) 238 20 42,

(0-32) 231 65 07

rete: staman@esperanto.pl

pea@esperanto.pl

Dio benu!

La 18an kaj 19an de oktobro (sabate kaj dimanĉe) okazos sur la He-la Monto en Ĉenstoŭovo, en kapelo ene de la Pilgrimdomo, la Preĝtagoj por la esperantistaro. Komenco per la sankta Meso sabate je la 16a horo kaj fino dimanĉe per la Krucvojo, ĉirkaŭ la 14a horo. Pri la tranoktejo kaj vivteno ĉiu mem devas zorgi.

Kore invitas ĉiujn

pastro Jozefo Zielonka